


HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, aldono al HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO
senpaga por ĝiaj abonantoj. Adreso: Julio Mangada Rosenörn. — Glorieta
de Bilbao, 5, MADRID

NUM. 7. — JULIO 1928



Domo de Pilatos. Arta pordo.—SEVILLA.

VII^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN SEVILLA

(De la 5.^a ĝis la 9.^a de novembro de 1928.)

La Ĉiama Honora Prezidanto de H. E. A., D-ro Carlos María Cor-tezo, je la nomo de la Asocio proponis per respektoplena peticio al LIA REĜA MOŬTO ALFONSO XIII^a la HONORAN PREZIDANTE-CON, kaj la rezultato estis, ke la Duko de Miranda, je la nomo de la Reĝo, respondis la jenon: «Lia Reĝa Moŝto (kiun Dio gardu dum multaj jaroj) plezure decidis komplezi vian peticion kaj la dezirojn de la His-pana Esperanto-Asocio, kiun vi inde honore prezidas, akceptante la Honoran Prezidantecon por la VII^a Nacia Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Sevilla, de la 5.^a ĝis la 9.^a de novembro de la nuna jaro.»

«Laŭ Reĝa Ordono. mi tion komunikas al vi por via kono, samtem-pe esprimante la dankemon de la Reĝo pro la afabla propono.»

La Reĝo, do, kiu ĉiam sin montris ema al Esperanto, sankcias nian Nacian Kongreson kaj estus dezirinde, ke efektive li ĉestu la Kongre-son por konstati, per propra sperto, la gravecon de la internacia helpa lingvo Esperanto, kaj ĉi tiu kompletus la ĝojon de la Hispana Esperan-tistaro.

La afero pri fervojrabatoj disvolviĝadas favore, kaj ĵus finita ni sciigos pri ĝi.

La ĉefaj Aŭtoritatuloj de Sevilla favoras multe la Kongreson, pro kio ili meritas nian dankemon. Lia Kardinala Moŝto, la Provincestra Moŝto kaj samtempe Reĝa Komisaro por la Ibero-Amerikana Ekspozi-cio, kaj la provinca Deputatarestro, akceptis la respektivajn Honorvic-prezidantecojn, promesante helpon, kaj la lasta decidis, je la nomo de la Provinca Deputataro, 250 pesetojn por premii la plibonan Kanton al Hispanujo.

Por la literatura Konkurso alvenis originalaj verkoj el Rusujo, Estonio, Francujo, Ĉeĥoslovakujo, Germanujo, Hungarujo, Hispanujo, k. c. Oni disdonos la premiojn okazigante ĝin en teatron samtempe kun la festo de l'

ESPERANTAJ FLAGOJ KAJ STANDARDOJ.

Naŭ belaj fraŭlinoj blankvestitaj kaj reprezentantaj la literojn de la vorto ESPERANTO formas kvazaŭ KORTEGANINARON por disdoni la premiojn kaj pendigi belajn broditajn rubandojn de sur flagoj kaj standardoj.

Sendis mondonacojn Ateneoj de Oviedo, Jerez kaj Santander; la Barcelona Ekonomia Asocio el Amikoj de la Lando; la Provinca Deputataro de Oviedo; la Oficiala Ĉambro de Urboposedadoj de Oviedo; la Oficiala Komerca Industria kaj Navigacia Ĉambro de Oviedo; la Ĥoro de Oviedo, kaj oni scias pri novaj aliĝoj de gravaj Asocioj el diversaj provincoj.

Atentu bone kaj ĝoju ĉar estas eĉ pensionoj po ses pesetoj ĉiutage; do, ĉiuj povos havigi al si loĝejon laŭ siaj monrimedoj, eĉ oni celas malpliigi tiun prezon.


La ĵurnaloj *El Correo de Andalucía*, *El Noticiero Sevillano*, *La Unión* kaj *El Liberal*, pritraktas longe kaj konstante la Kongreson.

Estas dezirinde, ke grupoj, Asocioj, k. c., kvankam ilin reprezentu unu sola persono, montru en la Kongreso sian flagon aŭ standardon, por kio tiuj, kiuj ankoraŭ ne ĝin havas celu havi ĝin kiel eble plej baldaŭ. Ĉiuj, kiuj aliros kaj prezentos flagon, devos tion sciigi je unu monato antaŭ la dato de la Kongreso.

Jen la novaj aliĝoj:

Número 164, Cámara Oficial de Comercio, Industria y Navegación, de Oviedo. Núm. 165, Cámara Oficial de la Propiedad Urbana de la Provincia, de Oviedo. Núm. 166, Ateneo Popular, de Oviedo. Núm. 167, Orfeón Ovetense, de Oviedo. Núm. 168, Esperanta Grupo «Oviedo», de Oviedo. Núm. 169, don José Rubio Morales, de Peñarroya-Pueblonuevo (Córdoba). Núm. 170, doña Sara U lastres, de Gualba (Barcelona). Núm. 171, doña Amalia Núñez Dubús, de Pamplona. Núm. 172, don Juan Gallardo Corredor, de Peñarroya-Pueblonuevo (Córdoba). Número 173, señorita María Garzón Rufo, de Sevilla. Núm. 174, don Manuel Gómez Sánchez, de Sevilla. Núm. 175, don Miguel Ribas de Pina, de Palma de Mallorca. Núm. 176, don Anselmo Alvarells, de Cabruñana (Oviedo). Núm. 177, don Leopoldo Argüelles, de Cabruñana (Oviedo). Número 178, don Julián García Claver, de Madrid. Núm. 179, doña Asunción Ruiz, de Madrid.

Rimarko: Leterojn, kotizojn, mondonacojn, k. c. sendu al la Sekretario-Kasisto, S-ro Carlos Martínez. Strato Rioja, 25. Sevilla.



Palaco San Telmo.—SEVILLA.

PRI NIKARAGVO

La malgrableĵoj, kiuj doloras la popolon de ĉi tiu nacio, devenas de la celo konstrui novan kanalon por kunigi la Pacifikan kaj Atlantikan Marojn, profitante la riveron San Juan kaj la lagon de Nikaragvo, kiun volas havigi al si Usono, ne respektante la rajtojn de civilizita popolo.

La ideo pri ĉi tiu kanalo estas malnova, ĉar kiam regis la teritorion de la nuna Respubliko, tiam Kolonio de Hispanujo, Rodrigo de Contreras, kaŭze de Reĝa Decido de la 9.^a de septembro, de 1536^a, oni faris ekspedicion per sep ŝipoj kun pli ol 500 personoj, por esplori kaj studi ĉion necesan al konstruado de la kanalo, kies avantaĝojn tute klare koscias la Hispanoj.

Rimarkinde estas konstati, ke, je tiu epoko, estis granda trafiko per la rivero; sed nuntempe nur malgrandaj ŝipoj povas atingi la lagon. Ĉe la bordo de la lago pli proksima je tiu de la Pacifiko, oni elŝipigis la komercaĵojn, kiujn oni transportis poste al Pacifiko; kaj ĉi tiu trafiko estis tiel grava, kiel tiu de Panama.

La faroj de la piratoj, dronigante multenombrajn ŝipojn en la rivero San Juan, malebligis en tiu epoko efektiviĝi la planon, kiu poste renaskiĝis diversmaniere, eĉ utiligante la lagon de Managua.

La Kanalo de Panama forgesigis tiun projekton; sed pro nesufiĉeco de tiu, de nove vikle pensas pri la projekto, kaj ĝi estas la kaŭzo determininta la enmiksiĝon de Usono en la internajn aferojn de Nikaragvo. Je 1916^a, Usono kaj Nikaragvo subskribis Traktaton; per kiu Nikaragvo cedis ĉiujn siajn rajtojn pri la projektita kanalo eĉ teritoriojn kaj maran militstacion ĉe la golfo de Fonseca. Ĉi tiu traktato estas vera malsaĝaĵo pro perfortdevigo de Usono, ĉar eĉ la Registaro de Nikaragvo cedis tion, kio ne apartenas al ĝi, tial ke la golfo de Fonseca apartenas ankaŭ al Salvador kaj al Honduras, kaj Costa Rica havas rajtojn sur la riveron San Juan kaj sur la golfeton Salinas.

Sur paĝoj de la libro de D-ro Soto Hall, «Nikaragvo kaj la imperiismo de Usono», aperas opinio de la Usona ministro por eksteraj aferoj Mr. Root, laŭ jeno: «Mi ne estas trankvila kaj mi timas pensante ĉu la Registaro de Nikaragvo subskribinta la Traktaton Bryan-Chamorro reale reprezentas tiun popolon, kaj se oni povas konsideri tiun Registaron legitima kaj libera agento por ĝin subskribi, ĉar mi legis la

informon de la estro de niaj marsoldatoj en Nikaragvo kaj mi rimarkis la jenon: «La nuna Registaro ne havas la regadpovon laŭ la memvolo de la popolo; la elektoj estis falsaj tutplene», kaj per la sama informo



mi sciis, ke la kontraŭuloj de tiu Registaro kalkulas tri kvaronojn el la loĝantaro.

«Ĉu ni povas konsideri atentema kaj leĝa Traktaton, kiu estas tiel grava por Nikaragvo, per kiu oni donas al ni rajtojn sur la teritorion kaj por ĉiam, kiun ni faris kun prezidanto reprezentanta nur la kvaronon el la loĝantoj kaj kiun nur subtenas la forto de niaj armiloj, kaj al kiu, laŭ la traktato, ni devos doni grandegan monsumon, por ke li ĝin disponu laŭ sia prezidanta decido? Mi bedaŭrus profunde se mi vidus Usonon en tiu situacio». Sed Usono, per siaj maraj soldatoj kaj aeroplanoj, mortigas la liberajn kamparanojn kaj vilaĝanojn de Nikaragvo, arogante al si la defendon de tia prezidanto kontraŭ la volo kaj rajto

de la plimulto el la enlandanoj; dume hipokrite la usona Registaro agas por malaperigi la Militon: la usona Registaro atentu, ke la plej bona predikado estas la konduto; tial, ĝi lasu al la popolo de Nikaragvo agi laŭ ĝiaj rajtoj.

ATENTU!

Preskaŭ certe vi ne ricevos la numeron de aŭgusto de ĉi tiu gazeto, ĉar mi celas aliri al la Kongreso de Antverpeno, kaj estos neeble al mi pretigi la materialon, k. t. p., por tiu numero; sed mi kompensas la mankon de tiu numero per tre interesa broŝuro hispane verkita pri la hispana esperanta movado.

LA EMPIRIA SCIENCO PRI LA PRAHISTORIA HOMO LAŬ D-RO CARBALLO

La homo ĉiam estis kaj estas la sama, t. e., la homo konata certe de la Scienco, ĉar de la vidpunkto koncernanta la hipotezan homon la opinioj estas aliaj; D-ro Carballo, kiel geologiisto, asertas, ke la prahistoria kaj geologie kvaternara homo, unika, kiun ni konas ĝis nun, kun plena certeco, de la intelekta vidpunkto absolute ne estas malsama je la nuntempa.

Hodiaŭ mem vivas homoj eĉ popoloj same, kiel vivis homoj kaj gentoj dum la ŝtonepoko; kaj ĉi tion pruvas la Paleontologio, kiam oni ĝin studas serene sen antaŭjuĝoj.

La ĉefa elmontritaĵo de iu kulturo estas la scienco: sekve venas la industrio kaj la artoj, kiuj nur estas la sciencaj aplikadoj; tial, same tiam, kiel nun, la industrioj kaj la artoj ne povis ekzisti sen antaŭa scienco naskanta ilin. La prahistoria homo atingis grandan industrian progreson: li konis la mineralogion kaj ĝian aplikadon, la minekspluatadon, kaj ĉi tio pruvas, ke li ankaŭ posedis relativan sciencan progreson. La bioĥemiaj procedoj, kiujn hodiaŭ uzas la Medicino, komenciĝis per la vulgara observado de la fluidiĝoj kaj osmozaj fluoj (osmozo estas propreco de iuj fluidaĵoj por trapasi membranon, kiun aliaj fluidaĵoj ne povas trapasi); la nuntempan konkiron de la scienco pri la teorio de la kristala strukturo ni ŝuldas al la kruda kaj empiria ellamenigo



Pregejo San Luis.—SEVILLA.

de la spata romboedro, kiun hazarde konis Hany. kiu, de ĉi tiu hazar-dajo. devenigis siajn famajn kristalografiajn leĝojn.

La prahistoria homo, de siaj unuaj tempoj, konis ĉiujn mineralajn kaj rokajn specojn, kiujn li bezonis por siaj industrioj. Li konis detale la proprecojn, strukturon, malmolecon, ellamenigon, k. c., de ĉi tiuj mineraloj. Ĉi tie mem, en Madrido, ĉe la paleolitejo de Sankta Isidro, kiu estas unu el plej malnovaj de la mondo, oni trovas abundajn haki-lojn el kvarcito, kiu estas grajnoida, kompakta, malmola roko el kvar-co kaj glimo, ofte ĝi havas skistan aspekton, tre abunda, sufiĉe mal-mola por atingi tranĉandon. Iom post iom la homo atingis koni pliajn mineralojn kaj rokojn, kiujn li utiligis, kiel krudajn laborotaĵojn de siaj industrioj, tial kaj tiel, ni rimarkas, ke je la periodo al kiu apartenas la groto de Altamira, li jam konis la silikon, kvarcon, kalcedonion (kiu estas vario el agato), agaton, opalon, hematiton, kaj aliajn multenom-brajn. Plie, li sciis profiti kaj labori la eburon por fari statuetojn, uti-ligi la emajlon de l'konkoj kun ĝia kolorŝanĝemo por ornamaĵoj, kolrin-goj kaj braceletoj; la malmolan kornon de l'cervo kaj de l'norda cervo, por fari pikilojn, ponardojn, sagpintojn, k. c. La kudrilojn rimarkinde perfektajn li faris el ĉevalostoj, utiligante la fibrozan parton de la tibioj. La Prahistoria Muzeo de Santander estas riĉa je ĉi tiuj aĵoj. Li sciis fari la trepanadon, kaj ĉi tio pruvas lian scion kaj sperton pri ĥirurgio kaj medicino; per la famaj pentraĵoj de la groto de Altamira, tute bone oni konscias pri liaj anatomiaj konoj, tiamaniere, ke moderna naturalisto povas klasigi animalan specon laŭ modernaj procedoj vidante la pentrejojn, ĉar estas tiel delikate pentrita la anatomia ka-raktero, ke la simpla rigardado estas sufiĉa por la klarigo. Koncerne la botanikon ne tiel precize oni povas certigi, Ĉar la plantoj utiligitaj de la prahistoria homo ne povis restadi tra la tempoj, pro kio oni ne povis trovi lignajn ilojn; sed observante la iamajn pentraĵojn kaj gra-vuraĵojn, oni rimarkas iujn plantojn, kaj ĉi tio elpruvas la atenton de la prahistoria homo al la botaniko. Sed plie, observante la sagpintojn el cerva horna, oni rimarkas sulkojn kaj striojn samajn, kiaj estas prepa-rataĵoj de la nuntempaj necivilizitaj homoj, kaj prave certigi, ke la pra-historia homo faris same, kaj konis la utiligon de la ligno kaj la veneni-gon de la sagoj per vegetaraj substancoj.

LA UNUA KAJ LA LASTA

Kampa rato ekeliris el sia kavo kaj vidis malproksime belan pomon.

—Tio estas por mi — ĝi ekkriis kaj proprigis al si la pomon.

Sed simio rapide malsupreniris de arbo, proksimiĝis al rato, forrabis al ĝi la pomon, regrimpis la arbon kaj kriis triumfe:

—Tio estas por mi!

Agloflugadis majeste, vidis la scenon de supre, kaj, kiam la simio ne estis ankoraŭ ĝuanta sian venkon, ĝi sin ĵetis sur ĝin, rabis al ĝi la pomon kaj suprenflugis kriante:

—Tio estas por mi!

Tiam ĉasisto ekvidis la aglon, pafis kaj la besto falis teren grave vundita. La ĉasisto diris:

—Mi estas la ĉefa estaĵo, la reĝo de l'kreado, sekve tio estas por mi!

Li prenis la pomon kaj mordis ĝin, sed la frukto estis kava kaj en ĝi loĝis vermo, kiu diris al la viro:

—Tio estas por mi!

.....
La fabelo, hispane verkita de Ramiro Blanco, pravas, ke ĉiu akiraĵo, ŝtele aŭ perforte akirita, estas nelongedaŭra propraĵo, tial ke frue — malfrue ĝi revenas al unua posedanto, kaj tiamaniere ĉiam restariĝas la justeca ekvilibro. Spertu. Usono!

Fernando Redondo

LA HISPANA SOCIALISTA KONGRESO KAJ ESPERANTO

Nia entuziasma sperta kaj klera samideano de Cordoba Francisco Azorin prezentis proponon al la nacia socialista Kongreso pri ne platona alprenado de Esperanto, ĉar la nova spirito kreiga en la mondo postulas, precipe por la laboristoj, interkomprenilon; kaj tial ke Esperanto estas jam praktika vivanta lingvo kun internacia kompleta senco. Ankaŭ li petas, ke oni sendu reprezentanton al la proksima Kongreso de Esperanto ne malhelpante la enkasigitaĵon.

S-ro Saborit, konstatante tion, kion asertis S-ro Azorin, diris esti praktike nerealigebla hodiaŭ la starigon de Esperanto ĉe la internaciaj laboristaj organizaĵoj, ĉar ĉi tio postulus grandajn monsumojn kaj ankoraŭ ne estas sufiĉe bone instruitaj pri la lingvo multaj kaj grandnombraj socialistaj anaroj. Li diris ke li fariĝus esperantisto se li havus tempon liberan por la studo, kaj sin montris konforma je la aliĝo al la Kongreso laŭ propono de S-ro Azorin.

Pla kaj Armengol defendis la alprenon de internacia helpa lingvo malaperiganta la landlimojn kaj antagonismojn inter la popoloj, petante oni helpu la Internacian Socialistan Unuiĝon por atingi la alprenon de la nova lingvo.


S-ro Azorin konstatigis, ke ekzistas internaciaj organizaĵoj, kiuj utiligas Esperanton por siaj rilatoj: la Internacia Unuiĝo de Komunikiloj kaj la Internacia Centra Laboroficejo.

Saborit proponas amendon al la propono: «rekomendi la alprenon de la internacia helpa lingvo Esperanto», kaj tial kaj tiel unuanime voĉdonas la amenditan proponon.

FRAGMENTO

Perforto ne estas ĉiompova. Iam predikado pri ideoj, pri doktrinoj, povis pli, ol glavoj, lancoj kaj sagoj; ĵus, tion, kion ne trafis kanonoj, kirasitaj ĉaroj, sufokantaj gasoj, celis solvi pacemaj perantoj kaj ĝentilaj interkonsilantoj. La malnova leciono estas sama, kia estas tia de la tempo de la dukapaj agloj kronataj. La praveco kaj la justeco estas ĉio; la meĥanika forto estas nenio. Hispanujo, el ĉio, kion ĝi atingis per la armiloj sur la tuta mondo, nur konservas tion, kio firme restadis dank' al spiriteco de ĝia elserĉado kaj al majesteco de ĝia lingvo. Germanujo, respektita tra la tuta mondo, trafinta la popolojn per siaj artoj, industrioj kaj scienco, perdis ĉion ĵus ekpafis ĝia unua kanono en Belgujo. Nur estas sola tutpotenca forto: tiu de la spirito; nur estas sola ĉiam nevenkebla lanco: tiu de Minervo.

La leciono estis konkluda. Ni pendigu la ŝildon kaj forĵetu en la forgesojn la lancon; ni eningigu la spadon kaj lasu la pafilon preta nur por okazo de invado, kaj ni celu, ke la konservado de nia honoro firme



Unu el la Pordoj de la Katedralo.—SEVILLA.

staru sur niaj propraj agoj kaj sur la fremdaj interesoj, tiamaniere, ke ĉi tiuj lastaj ne estu kontraŭaj je niaj, kaj ĉi tiuj kontraŭaj je tiuj de la Homaro. Nur firman konkiron atingas la reciproka kaj necesa kunvivado kaj interrilatigado; nenia konkiro persistadas longedaŭre se ĝin ne firmigas interkompreniĝo kaj amo de unu al la alia. Malnovaj potenculoj, nepre, spite de ĉio, falis; iliaj mirindaj urboj—Palmira, Memfis, Jerusalemo, Tiro, Kartago, Romo—fariĝis cindroj kaj ruboj; sed ilia laboro kuniĝis al la vivo de la novaj popoloj. Estas Providenco en la Historio, kaj socia Etiko en la sinsekvado de la tempo: tio, kion oni kreos per la fero, per ĉi tiu oni malaperigos; nur firme longedaŭre staradas tio, kies bazo estas la plenumado de la komuna celo kaj supera homa bono, ne la egoismo de kelkaj potenculoj kaj efimera gloro de vantaj kaj fieraj legioj.

KRONIKO

ENLANDA.—*Madrido*.—Kaŭze de peticio de la H. E. A, al Ministro de P. I. por ke oni ne baru instruadon de Esperanto en la oficialaj Institutioj de l'Ŝtato, jen rezulto:

«Ministerio de Publika Instruado kaj Belaj Artoj.—5.^a Fakoj.—Publikigataĵoj Statistikoj kaj Oficialaj Informoj pri Instruado. Atentante vian peticion al ĉi tiu Ministerio, petante ke oni rajtigu tiun Asocion por starigi senpagajn kursojn de Esperanto en la Oficialaj Centroj por Instruado, kaj konsiderante ke, laŭ la peticio mem esprimas, la Reĝa Ordono de la 27.^a de julio de 1911 estas en aktiva funkciado, kaj ĝi rajtigas tion, kion nun vi petas; ĉi tiu Ĝenerala Direkcio decidis komuniki al vi ne estas necesa nova deklaro pri la afero.—Mi komunikas tion al vi por via kono kaj sekvoj.—Dio vin gardu dum multaj jaroj.—*Madrido* la 31^{an} de majo de 1928.—La Ĝenerala Direktoro por Supera kaj Mez-supera Instruado. González Oliveros (parafo).—D-ra Moŝto Carlos Maria Cortezo, Konstanta Honora Prezidanto de la Hispana Esperanto-Asocio, *Madrido*.»

Jam ne estos eble al Rektoroj de Universitatoj kaj Direktoroj de Institutoj, Normalaj Lernejoj, k. t. p., bari la malfermon de senpagaj memvolaj kursoj de Esperanto, kaj kiam venos denove la proksima

kurso la peticioj por la malfermo devos atentigi pri ĉi tiu lasta decido. Oni devas peti de la Sekretario de H. E. A. kopion de la dokumento por transkribi ĝin fidele sur la novaj peticioj kaj eviti malfacitaĵojn.

Unio-Radio, la tre grava sendostacio de Madrido, disaŭdigas denove esperantan kurson, novaĵojn pri Esperanto, pri nia enlanda movado, tre grava, kaj pri ĉio koncernanta la Kongreson de Sevilla. S-ro Mojado, du fojojn ĉiusemajne, parolos per la mikrofono.

Oviedo. – S-ro Antonio Jiménez kun la semideanaro de «*Esperanta Grupo Oviedo*» organizis kaj efektivigis propagandekskurson al Grado, Avilés, Candás kaj Gijón, la 10^{an} de la pasinta majo, per aŭtobuso. Antaŭe, S-ro Jiménez petis permeson al la Provincestro, kiu ekspedis la jenan dokumenton: «*Provincestrejo de Oviedo, Oficejo de Publika Ordo, Num. 2.040.* Oni rajtigas vin por organizi propagandan ekskurson pri la internacia helpa lingvo Esperanto, je la morgaŭa tago, 10^{an} de la nuna monato, elirante de ĉi tiu urbo je la 9^a matene al Trubia, Grado, Avilés, Gijón kaj reveno al Oviedo, kaj por okazigi paroladojn en tiuj lokoj ĉe la sidejoj de Asocioj. Mi komunikas al vi ĉi tion por via kono kaj utilo, kiel rezultato de via peto, datumita je ĉi tiu dato, kaj mi esperas, ke la Urbestraj Moŝtoj, Civilgvardia Korpuso kaj Policianoj dependantaj de miaj Aŭtoritateco ne baros, nek malfaciligos vian kulturan laboron, kaj ke, se estus necese, ili helpu ĉiel por ke vi efektivigu vian kulturan kaj instruantan laboron inter ĉiuj, kiuj havas simpatian al tiu helpa lingvo. Dio vin gardu dum multaj jaroj. Oviedo 9^{an} de junio 1928, La Provizora Civila Provincestro. Felipe Rey (Parafo). Al S-ro Antonio Jiménez Mora, Prezidanto de «*Esperanta Grupo Oviedo*».

(Rimarko de la Redakcio. – Ni aperigas la tradukon de la dokumento por edifo al aliaj aŭtoritatuloj, ĉar la teksto estas tre laŭdinda kaj imitinda, pro kio ni gratulas tutkore Prezidentan Moŝton de la Juĝistejo de Oviedo, S-ron Felipe Rey.)

Oni ne povas detale raporti pri la grava ekskurso: la ekskursantoj estis el la kvar Grupoj de Oviedo, sesdek samideanoj; ĉe Grado, la Urbestro kun iuj samideanoj akceptis la ekskursantojn, kaj la Urbestro proponis al la propagandistoj firman apogon; ĉe Avilés estis longa restado kun la enurbaj samideanoj kaj ankaŭ la Urbestro akceptis ilin kore, sin montrante entuziasma kaj favora al Esperanto; apud Candás, kontraŭ la brueganta maro, sur herbejo, oni preparis la tagmanĝon, oni tagmanĝis kaj ŝercis, kaj fine al la aŭtobuso, kaj post malgranda halto

kaj vizito al la ermitejo de la fama Krucumito, al Gijón, kie la samideanoj frate entuziasme akceptis la ekskursantojn. Ĉe la Katolika Klubo, inĝeniero kaj advokato S-ro Castro, malnova kaj sperta samideano, salutis varme ilin, respondante, S-ro Jiménez; de tie, al la Ateneo, kie S-ro Villa kaj Menéndez Rúa kun ceteraj samideanoj, akceptis la ekskursantojn en plena zamenhofa sento, kaj je la nomo de ĉi tiuj S-ro Cantalapiedra dankis la afablan akcepton, kaj varme parolis pri la fono de la Federacio kaj ĝia unua Kongreso en Gijón, je la proksima aŭgusto. Post agrabla restado, al Oviedo.

Sekve de la ekskurso, oni malfermis diversajn kursojn en Grado, Avilés kaj Gijón, ĉi tie sub gvidado de S-roj Villa kaj Menéndez Rúa.

Cambruñana kaj Grado. La paroĥestro de *Cambruñana*. S-ro Anselmo Albarellós fariĝis certe la plej grava apostolo de Esperanto lastatempe, li tute rapide esperantigis, konsciinte la gravecon de Esperanto, kaj esperantigis la Nacian Instruiston, S-ron Leopoldo Argüelles, kaj ambaŭ prezentis siajn laborpruvojn al la Instituto, kiu liveris al ili la respektivajn diplomojn. Sed ĉi tio ne kontentigis ilin; kaj precipe la paroĥestro ekpropagandis entuziasme tervore kaj alloge por plimultanoj, sed ne tiel koncerne politikistojn kaj pastrojn, kiuj ekagis male; tamen li ne malkuraĝiĝis, kaj portante tre videbla la verdan stelon, li vizitis ia episkopan Moŝton por klarigi al li sian esperantan konduton. Sekve li organizis kurson el 34 lernantoj, kiun gvidas S-ro Argüelles, kaj ĉe la proksima *Grado* li mem klarigas kurson al 220 lernantoj, kaj nun laboras por starigi Grupojn, Li meritas gratulantan poŝtkartaron de la samideanoj.

Rodiezmo. — Okaze de vizito de nia nelacigebla asturia pioniro, S-ro Antonio Jiménez Mora, li esperantigis la Urbestron, la Sekretarion de ja Urbestro kaj filon de ĉi tiu. Sed la Urbestro perfekte konsciis Esperanton de ĉiuj vidpunktoj, kaj li kunvenigos la Naciajn Instruistojn kaj Paroĥestraron de la Urbteritorio por alparoli ilin, por instigi ilin al alprenado kaj propagando de Esperanto.

Zaragoza. — Ju pli la tempo pasas, des pli mirinda fariĝas la rezultato de la Mitingo: DEK UNU KURSOJ funkciadas en la Grupejo, kaj al nia Asocio aliĝis multaj amikoj de Esperanto por helpi la prapagandon. Krome, S-ro Campos klarigas du aliajn kursojn, S-ro Maynar alian.

La 20^{an} de majo nia nelacigebla samideano, S-ro Isidoro Achón, reprezentante nian Grupon «Frateco», vizitis *Egea de los Caballeros* (Za-

ragoza) por paroladi pri esperanto en la laborista Klubo, kie multenombra ĉeestantaro aŭskultis lin interese kaj lin aplaudadis varme. Certe sekvos fondo de grupeto.

En *Biota*, S-ro Tomás Navarro, kuracisto, ĵus fondis Grupeton kaj gvidas kurson.

La Komerca Ĉambro de Zaragoza monhelpas per 100 pesetoj la Grupon «Fratego».

Kun granda plezuro oni devas atenti ankaŭ la gravan neatenditan renaskiĝon de Esperanto en Zaragoza, kie jam sin preparas por suferi ekzamenojn multenombraj lernantoj sub gvidado de S-roj Maynar, Campos kaj Oros, membroj de la Hispana Esperanto Instituto.

La Urbestro rajtigis la Grupon «Fratego» uzi la ŝildon de la Urbo, kaj ĉiam sendas invitilon por ĉiuj ceremonioj.

Cheste (Valencia).—Je la fino de junio, kunvenis en ĉi tiu urbo la junaj vegetaranoj esperantistoj. S-ro Francisco Mañez ĉeestis kaj partoprenis la okazintaĵojn: entuziasmo, fervoro, fido kaj fideleco al vegetarana kaj zamenhofa sentoj reĝis konstante.

.....

SENDU KIEL EBLE PLEJ BALDAŬ VIAN KOTIZON POR HISPANA ESPERANTO ASOCIO. SE VI SENDUS SAMTEMPE TRI PLIAJN PESETOJN VI RICEVUS ĈI TIUN GAZETON, KAJ KIEL DONACON, LA UNUAN APERINTAN KAJERON DE «DON KIĤOTO» KAJ APERONTAJN DUM LA JARO DE TIU TUTMONDFAMA VERKO, KAJ LA HISTORIAN NOVELON EN PROZO KAJ VERSO «FERDINANDO VI^a KAJ FARINELLI». RAPIDU SENDI LA KOTIZOJN PETANTE LA LIBROJN, ĈAR LA RAJTO POR LA DONACO FINIĜOS. FREMDULOJ RAJTOS SAME, KIEL ENLANDANOJ, SENDANTE KVIN SVISAJN FRANKOJN PER POŝTĜIRO.

ENLANDANOJ sin turnu al S-ro MARIANO MOJADO, strato ABASCAL, 13, MADRID.

FREMDULOJ al S-ro JULIO MANGADA ROSENÖRN, Glorieta de Bilbao, 5, MADRID (Ĉi tiu akceptas dolaran bankvileton aŭ francajn bankbiletojn).

PRESEJO LUDOVIKO TORRENT KAJ K^o
Santa Teresa, 16.-MADRID-HISPANUJO